

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Vi aŭdas prelegon de Claude Gacond pri la instruado de fremdaj lingvoj en la lernejoj.

Mi montris, ke en klaso oni trovas gelernantojn, kies mens-strukturo estas analizema, dum aliaj gelernantoj malfacile perceptas la detalojn, ĉar ili vidas la tuton pli facile, ol la erojn. Ni nomu la unuajn analizemuloj kaj la duajn tutemuloj, ne forgesante, ke inter ili ni trovas geknabojn, kiuj estas samtempe analizemaj kaj tutemulaj.

Ni vidis, ke estas danĝere por la infanoj, kiam instruistoj uzas metodon, kiu konvenas ĉu nur al analizemuloj, ĉu nur al tutemuloj. Tiam dum grupo da gelernantoj rapide progresas, la alia renkontas artekreitajn de la instruado malfacilaĵojn. Antaŭ ol decidi, ke lernanto ne estas kapabla en iu fako, ni provu alian instru-metodon. Kun praveco gepatroj, kies infano ŝajnas subite malprogresi post ŝanĝo de instruisto, iras al la lernejestro por peti alian instruiston por sia infano. Se via pens-strukturo apartenas al unu el tiuj du kategorioj, vi eble havis la impreson, dum via lernanteco, renkonti instruiston, kies instruado ne konvenis al vi. Kiam vi estis en lia klaso, vi senkonscie sentis mankon de kontakto kun li kaj ne plu ŝatis iri al la lernejo. Povas esti, ke vian reagon kontraŭ tiu instruisto kaŭzis lia pens-strukturo, kiu kontraŭis la vian.

Tiuj mensaj diferencoj retroviĝas dum la tuta vivo. Ili estas konstantoj, kiuj karakterizas nin, kiuj markas nian personecon, nian pensadon, kaj niajn ŝat-okupojn.

Per diversaj detaloj de nia reago antaŭ difinita problemo oni povas kontroli, al kiu grupo ni tendencas aparteni.

Vi scias, ke la franca ortografio estas ege malregula kaj stulte malfacila. Do kiam franco skribas, li konstante devas pripensi ne nur pri la gramatiko de la lingvo, sed ankaŭ pri la interna ortografio de la vortoj. Jen la tipa reago de analizemulo, kiam li dubas pri la ortografio de vorto : li serĉas vorton parenkan kaj provas trovi la familiajn trajtojn, kaj se ne eblas, li trovos vorton, kiu simile sonas kaj ekzamenos, kiel ĝi estas skribita. Tutemulo reagis tre malsimile : li literumas aŭ provas skribi tiun vorton, kaj subite li sentas, ke formo pli konvenas, ol alia. Klarigi kial, tion li ne povas. Eble vi rekonas vin en unu el tiuj du grupoj. Se ne, tio estas, ke vi ĉu ne estas franco, ĉu apartenas al meza tendenco.

Se ni ekzamenas infanojn, kiuj desegnas, ni facile rimarkas la analizemulojn. Ili komencas per detalo ofte sensignifa kaj aldonas aliajn detalojn. La tutemuloj okupiĝas pli volonte pri la grandaj linioj, pri la enpaĝigo de la desegnata objekto, ili ofte ignoras detalojn sensignifajn, kiuj kontraŭe interesegis la analizemulojn.

Kaj nun ni revenu al la instruado de lingvoj. Kiel reagis la analizemuloj kaj la tutemuloj dum la eklerno de fremda lingvo ? Kiel ekzemplan lingvon ni prenos esperanton, sed la dirotaĵoj ankaŭ konvenos al la lernado de aliaj fremdaj lingvoj.

Kiam oni ekinstruas lingvon, oni tuj rimarkas du tendencojn ĉe la lernantoj, eĉ ĉe la infanoj (mi instruas jam de dek jaroj la germanan kaj de ses jaroj esperanton al geknaboj 10-jaraj kaj pli junaj).

Grupo da gelernantoj tre facile kapablas lerni vortojn kaj gramatikajn regulojn. Helpe de tiuj, ili tuj provas konstrui frazojn. Ili facile komprenas la fonetikan ortografion de esperanto, kiun ili ŝatas. Ili interesiĝas pri vortaraj kaj etimologiaj klarigoj. Esperanto konvenas centprocente al tiuj analizemuloj, dank'al siaj reguleco kaj aglutineco. Kiam vi renkontas esperantistojn, kiuj rakontas al vi, ke ili lernis esperanton dum kelkaj horoj, vi povas esti preskaŭ certa, ke ili ne fanfaronas, sed ke ili estas tipe analizemulaj. (Mi mem lernis esperanton dum sabata posttagmezo kaj poste tuj kapablis legi sufiĉe malfacilan libron : *La*

*longa vojo* de Richard Meye, la postan tagon. Sinjoro Charles Ecabert, kiun ni funebris antaŭ kelkaj semajnoj, ankaŭ apartenis al tiu kategorio de personoj.)

Inter la kursanoj troviĝas grupo, kiu reagas tute aliel. Per la lernitaj vortoj kaj gramatikaĵoj ili longe ne kapablas konstrui frazojn, sed ili povas facile parkeri kantojn kaj tekstojn, kiujn la analizemuloj malfacile digestus. Pri la reguleco de esperanto ili nenion profitas, ĉar ili konstante volas trudi al nia lingvo siajn naciajn kutimojn. Ilin ŝokas la fonetikeco: ili volas skribi *brili* per du *l*, prononcas *peko* anstatataŭ *peco*, *glazo* anstataŭ *glaso*. Tio ne signifas, ke poste ili estos malpli bonaj esperantistoj, tio signifas nur, ke per la analiza metodo ili nur malrapide progresos. Sed devigu ilin parkeri tutan teatraĵon kaj ili tion faros sukcese. Kun tiuj tutemuloj multe kantu. Ilin impresas la ritmo de la frazo pli ol la gramatika konstruo.

Vi aŭdis prelegon en esperanto. Parolis Claude Gacond, la prezidanto de Esperanto-Edukistaro de Svislando pri la instruado de la fremdaj lingvoj en la lernejoj.

-oOo-